TRJAVNA

Urb' malnova historia
kun mirinda nomo Trjavna,
ĉiam vi allogas nin
per beleco via ĉarma.

La horloĝ' ĉe olda ponto
staras jam de la jarcentoj,
atestanto estas ĝi fidela
de l' pasintaj glor-eventoj.

En lernejo eta kaj modesta
Slavejkov estis instruisto,
dum bulgara Renesanco
li poeto fama kaj verkisto.

La talentaj lignogravuristoj
antaŭ multaj, multaj jaroj
mirinde belajn ikonojn faris
ĉizis lerte ravajn altarojn.

Trjavna – jarcenta kaj alloga,
kaŝita en Balkan majesta,
en pasinto kaj estonto hela
en vi spirit' bulgara estos.

Georgi Mihalkov

Sofio, la 15-an de marto 2020